

Tradukarto

Metodo laŭ Martin Strid

Paŝoj

1. Elektu poemon (kanton, baladon...) tradukindan.
2. Analizu ĝiajn riman kaj ritman strukturojn: Kiuj partoj devas rimi inter si? Kiom da silaboj estas en ĉiu verso? Kiom da batoj, tio estas akĉentaj silaboj, estas – kaj kie (kiuj)?
3. Traduku (aŭ komprenu) la tekston de tuta strofo precize, tio estas la enhavon laŭvorte, verson post verso. Ne zorgu ankoraŭ pri ritmo kaj rimoj.
4. Per **rimvortaro** serĉu rimojn inter la rimigendaj versoj: Por vorto en unu verso esploru en la rimvortaro sinonimojn kaj alternativajn esprimmanierojn por la vortoj en alia verso.
5. Se rimvortojn malfacilas trovi bonajn, provu ŝanĝi la vicordon de enhavo en la strofo, translokigante inter versoj por doni eblojn rimi inter aliaj el ĝiaj vortoj.
6. Decidu kiujn rimvortojn uzi.
7. Traduku la strofon kun (aŭ per) la elektitaj rimvortoj.
8. Redaktu la vortojn de la tuta strofo kaj ilian vicordon por perfektigi la ritmon.
9. Provu ĉu la tradukita strofo "kuŝas bone en la buŝo", tio estas ke facilas ĝia elparolo. Poluru, se tio necesas, modifante la tekston.
10. Nete skribu la rezulton. Pretas.

Ekzemploj

Kantoj en esperanto:

<http://kantaro.ikso.net/>

Norda Kantaro:

<http://nk.tone.se/>

Baladoj en esperanto:

<http://balade.tone.se/>

Marteno

Martin.Strid@gmail.com

Svedujo

+ 46 - 703 152 615

. ĈĜĤĤŜŬ eĝĥĵa